



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 164

Decembro, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:


Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5


Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



Kio okazas nun?



La jaro finiĝas, kiel la 1900-aj jaroj se ne la jarcento kaj la jarmilo. Kion tio devas signifi por ni? Kial ni festu la ŝanĝiĝon al la 1-a de januaro 2000 pli ol ŝanĝiĝon de vendredo al sabato, la komenco de iu ajn semajnfino en nia moderna mondo? Dependas de la kalendaro, kiun ni uzas. La gregoria kalendaro, kiun oni uzis ekde la 15-a de oktobro 1582, unuigas grandan parton de la moderna ekonomia mondo, kaj la jaro 2000-a problemo por la komputoroj kaj komercistaro de la mondo eĉ pli reliefigas la retronombradon de la nuna jaro al la nova. Sed la gregoria ne estas la sola kalendaro. En Ĉinio la jaro 2000 estos 4698. En kelkaj islamaj kulturoj estas 1420. Je nia 1-a de januaro 2000, la dato de la hebrea kalendaro estos la 23-a de Teveth 5760. La kopta kalendaro ŝanĝiĝos al 1716, kaj la budha kalendaro al 2544. Majaa kalendaro montros la jaron 5119, kaj la dato de la persa islama kalendaro estos la 24-a de Ramadan 1378. En nekristanaj landoj, kiujn oni taksas esti du trionoj de la mondo, ne estos ŝanĝiĝo de la jarmilo, eĉ se la gregoria jarmilo ŝanĝiĝos nur la 1-an de januaro 2001.



daŭrigata ⇒

daŭras ⇒



Tamen, tiel signifoplena ŝanĝo de nia kalendaro donas al ni oportunojn por kune konsideri la historion de la pasinta jaro, la pasinta jarcento, eĉ la pasintaj mil jaroj. Ni povas konsideri tion, kio jam okazis, kaj rigardi antaŭen al tio, kion ni antaŭvidas aŭ esperas okazi. Mi pensas ke esperantistoj sentos renovigitan optimismon je la komenco de la nova jarmilo, same kiel ŝajnis okazi al uzantoj de la nova internacia lingvo je la komenco de la pasinta jarcento. Mi antaŭvidas pli fortan Esperanto movadon ĉar esperantistoj sentos sin pli kapablaj kaj pli valoraj en la internacia mondo. Kresko eble estos tre malrapida, sed mi kredas ke esperantistoj portos grandan optimismon en la novan jarcenton. Kion vi opinias?

— Bob Williamson

Opinio mia


Al la redaktoro:

En Usono, tri el kvar personoj subtenas la mortpunon por krimuloj; en Kanado, du el tri, laŭ opini-enketistoj. Pli ol 90 % subtenas militan preparon kaj „defendon” de la lando per perforto, mi konjektas. Tiu opinio estas sufiĉe universala ke ĝi ne estas enketinda. Mi supozas ke en la balkana areo (kaj la mondo ĝenerale) la plimulto subtenas perforton pere de la registaro. En Demokratio, se granda plimulto subtenas ion, artifiko ne povas ĉiam malebligi la deziron de la plimulto. Mi legis en tagĵurnalo ke, post la senarmigo de la popolo de Kosovo, la etnaj grupoj interĵetis rokojn. Kion fari?

Ĝis la tago kiam la plimulto de personoj en la balkanoj (kaj la mondo) estas kontraŭ perforto ... propagandado kaj memprotektado estas mia sola, malforta konsilo. Konsideru ke, kiam vi iras sur la stratoj de iu urbo en la mondo, la plimulto de personoj kiujn vi renkontas subtenas mortigadon. Bonan vojaĝon.

Via,

Reni Porter



Sen problemoj por Esperanto la ŝanĝo al nova jarmilo

La ŝanĝo de jarmilo ne kaŭzos problemojn por Esperanto. Tion konstatas la speciala komisiono de Komputila Rondo, kiu dum dek ok monatoj priesploris la demandon. Zamenhof jam en 1887 antaŭvidis la eblajn problemojn kaj indikis la jaron kvarcifere. Esperanto krom tio jam spertis la transiron de la naŭdeka jarcento al la dudeka. La nuna transiro ne implicas aliajn problemojn.

Specialan atenton la komisiono dediĉis al la demando, ĉu Ido povus esti kaŭzita de la ŝanĝo de jarcento. Ĝi konkludas, ke ne eblas trovi iun ajn pruvon pri tio. Laŭ la komisiono Idon kaŭzis cimo* – simile kiel ĉiujn postajn proponojn pri skribo- kaj lingvo-reformoj. La cimo ne estas en Esperanto mem, sed en la kapoj de la proponintoj. Post unu aŭ du oscedoj flanke de la sencimaj uzantoj de Esperanto la ĝenoj kutime senspure malaperas, estas la fina konstato de la komisiono.

— Magda-Lena (trovita en la interreta versio de satira gazeto *Male* ĉe www.esperanto.nu/male)

* cimo [angle, „bug”) estas ŝercklarigo pri komputoraj problemoj. Kiam komputora programo misfunkcias, oni diras ke tio estas pro „cimo en la programo” — La kompostisto

*La redakcio varme salutas vin okaze de
la festa sezono, kaj deziras al vi
bonsanon kaj feliĉajn spertojn dum la
venonta jaro.*

